

PLANOJ POR LA ZAMENHOF-TAGO

Por celebri la datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, MEL luprenos salonon, la sabaton 16an, en la kultura centro Centro Sociocultural Mariano Muñoz (tiu ejo estas ankaŭ konata kiel *Asociación Vecinal La Cornisa* <http://cornisa.org>). Ĝi troviĝas en la kvartalo Pradolongo-Usera, strato Cristo de Lepanto, metrostacio Almendrales. Ankaŭ proksimas la trajna haltejo Doce de Octubre (Cercanías).

Ni disponos la lokon ekde la 11a matene ĝis la 6a vespere. Ĉar oni kunmemoras la Tagon de la Libro, ni certe profitos por la prezento de novaj libroj. Miguel Fernández prezentos la kvar librojn, kiujn oni publikigis al li ĉi-jare: *Vamos, vemos / Ni iras, vidas; Tagoj kaj ruinoj; La defio vivi kaj krei* kaj *Miguel Hernández, poeto de l' popolo* (dua eldono).

La programo enhavos krome kelkajn prelegojn, ludojn, ktp. Se vi emas prezenti al ni ĉiuj ion interesan, certe eblos enprogramigi vin; kontaktu kun la MEL-prezidanto (vidu sube).

Eblos tagmanĝi en la kafejo de la centro; la tag-menuo kostas 10 € kaj konsistos el lentoj (vegetaraj) kaj fileo, alternative omleto, sen plia elekto. Ĝi inkluzivos deserton kaj kafon/infuzajon. Por partopreni la komunan tagmanĝon estas necese antaŭ-rezervi. Do se vi intencas tion, skribu al Manolo: <manolo (punkto) parra (ĉe) yahoo (punkto) es>. Tempolimo por rezervi: sabato 9a je la 24a horo. Poste ne eblos aliĝi al la komuna tagmanĝo.

Por tiuj, kiuj alvenos metroe, je la 10:45 staros homo kun verda flageto ĉe la elirejo de metrostacio Almendrales, lineo 3, por kune marŝi ĝis Centro Sociocultural Mariano Muñoz. Pliaj informoj venos; restu atenta en la kutimaj retlistoj kaj retforumoj.

Krome, la 18-an de decembro, lunde, oni organizis alian aktivadon, orientitan al la ekstero, en loko relative proksima: oni prezentos en asocio Marx Madera, en Orcasitas, la libron “Tagoj kaj ruinoj”. Tiu asocio havas sian sidejon en Plaza Asociación, 1, 28041 Madrid (trajnstacio Orcasitas). Ĝi estas malferma al esperantistoj kaj aliaj amikoj.

IAM PRETAS LA NOVA ELDONO DE “POETO DE L’ POPOLO”

Inter la libroj aĉetindaj dum la Tago de la Libro, ni povas rekomendi novaĵon, ĵus eldonitan: Kiel ni informis en pasinta numero, profitante la kunmemoron de la 75-a datreveno de la morto de la granda hispana poeto Miguel Hernández, Hispana Esperanto-Federacio publikigis novan eldonon de la antologio “Miguel Hernández, poeto de l’ popolo”, tradukita al Esperanto de la poeto Miguel Fernández.

Miguel Fernández, kun la prezidanto de HEF, prezentis la libron al la neesperantista publiko, dum kongreso pri la memoro de la paŝtisto-poeto, organizita en la urbo Alikanto, la 16an de novembro.

La libro jam troviĝas en la sidejo de HEF, kaj estas tie aĉetebla.



EKSPOZICIO PRI ESPERANTA PIONIRO

La 14-an de novembro, okaze de la Semajno de la Scienco en Madrido, en la Altlernejo pri Aeronautika Inĝenierado de la Politeknika Universitato de Madrido inaŭguriĝis ekspozicio pri Emilio Herrera, kunmemore de la 50-a datreveno de lia morto. Samtempe oni inaŭguris virtualan ekspozicion kaj retejon: <http://aerobib.aero.upm.es/ehl/>. Kiel estas sciata, Herrera estis esperantisto, inter multaj aliaj aferoj, kaj eĉ se tio ne aperas en la ekspozicio, tamen en la retejo, se oni iras al “Archivo Emilio Herrera”, vi trovos materialon en aŭ pri Esperanto.

NOVA POEZIA VESPERO

La 13an de novembro oni denove organizis poezian rondon en la sidejo, gviditan de Jorge Camacho (vidu foton apude). Ĉikaze, ni dediĉis ĝin al la poeto kaj tradukisto Kálmán Kalocsay.

Ni ripetos la sperton jam en januaro.

**NOVA KURSO ANTAŬVIDITA**

La kurso en Fuenlabrada, kiun ni anoncis, estas jam plena.

Ĉar venis postaj interesiĝoj, oni antaŭvidas organizi novan kurson en la sidejo de MEL, post la jarfinaj ferioj. Ĝin gvidos Andy Hernández, tre probable ĉiulunde post la 5-a vespere. Kontakti kun Liceo, ĉe madrid@esperanto.es aŭ rekte kun Andy, se vi interesiĝas.

VIZITIS NIN

Nia korea samideano Heroo, kiu studis en Madrido antaŭ kelka tempo, denove venis nur por kelkaj tagoj komence de novembro, kun sia koramikino. Li ĉeestis la babilrondon unuasabate, la 4-an de novembro.

La italia samideano Michael Boris Mandirola, antaŭa prezidanto de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, venis al Madrido la 26-an de novembro, survoje al sia partopreno kiel reprezento de TEJO en membrokonsilio de Forumo Junulara Eŭropa en Cascais. Li pasigis tie ĉi preskaŭ la tutan tagon kaj renkontiĝis kun E-amikoj.

ALIA NOMO ESPERANTISTECA

Alvenis al la adreso de HEF mesaĝo, proponante presajn servojn. Nomo de la entrepreno: ARTON KREI: <http://www.artonkrei.com/>. Ĝi situas en Las Rozas.

Tio ne aspektas hazardo, ĉu?

KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. Atentu tamen ke por la 18-a oni organizis la prezentadon menciitan komence, kaj do probable neniu malfermos la oficejon. Krome, la lasta lundo de la monato estos la tago de Kristnasko. Do, telefonu la sidejon dum la lasta monatduono, antaŭ ol veni, por certi ke ĝi estos malferma.

Ĉi-sabate, la 2-an de decembro, unua en la monato, okazos la kutima renkontiĝo de esperantistoj en la Café Madrid, strato Mesón de Paños, 6, proksime al metrohaltejo Opera, je la 18:00. Novuloj kaj komencantoj estas tre bonvenaj por praktiki.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com